vi ŝuldas 50,- por EPĈ.
1953.

# La Pacdefendanto



N-o.14. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO. FEBR.1953.

## KION DIRAS NIAJ LEGANTOJ:

.......vi ja tre bone ĉion kalkulas, mi eĉ miris,kian miraklon vi sukcesis fari kun la sumeto,kiun mi tute ne supozis enkalkuli ien.- Ĵus mi trovis en nia stacidomo belan prospekton pri la urbo Plzeň,via regiono,kiu estas ne nur industria, sed ankaŭ plena de naturbelaĵoj.Jam pro tio estas necese,ke vi tenu pluo la torĉon de nia movado en Bohemio kaj en la tuta pacama Ĉeĥoslovakio. Vi devas scii,ke multaj el ni ĉerpas forton kaj esperon el via PACDEFENDANTO,esperon,ke nia nobla kaj justa ideo vivos kaj venkos sur la bazo de justa socialismo.Mi deziras al vi plenan sukceson kaj subtenon de ĉiuj gesamideanoj en-kaj eksterlandaj,por vi ĉion bonan kaj por ni ĉiuj,pacon kaj prosperon por Esperanto.Jarm.Faltýnková,Val.Meziříčí.

....... mi salutas kaj gratulas la red.de„PACDEFENDANTO",kiu kiel pacbatalanto por la granda ideo esperantista defendas la homan verkon, kiu devas demokrate kunfratigi la homojn de la tuta mondo! ......... Francisko Floramo - Torino - Italio

....... okaze de nova jaro 1953.mi deziras al vi sanon kaj multan feliĉon,por ke viaj bonaj deziroj realiĝu. Elkore salutas kaj manpremas vin pro via kuraĝo via bulgara amiko - Liubomir Kr.Levičaroff-

....... mi uzas okazon de nova jaro por gratuli vin pro via persisto, kun kiu vi eldonas kaj redaktas LA PACDEFENDANTON.Precipe via raporto pri la likvida kunveno en Praha al mi plaĉis.Estu salutata kaj akceptu amikajn bondezirojn por la nova jaro.... Stan.Kamarýt -Chotěboř

...... mi petas vin,ne laciĝu en via poresperanta laboro kaj kredu ke via laboro estas tre fruktodona kaj necesa...B.Novotný,Hlušovice.Ĉeĥoslovakio.

...... mi esperas ankaŭ regule ricevi LA PACDEFENDANTOn,ĉar tiu ĉi cirkulero apartenas al mia ŝatata esperanta-legado.Mi dankas kore por via kamarada helpo kaj sincere mi deziras al vi por nia komuna afero multan sukceson.Kredu,ke kdino en Praha ne dormas -mi korespondas multe kun gek-doj el eksterlando kaj mi kredas,ke nia amata Esperanto venkos. Vivu la pac-esperanto!-M.Rohlíková-Praha-Hloubětín,Ĉeĥoslovakio.

...... mi tutkore dankas al vi por via oferema laboro dum la distribuado de EPĈ,sed ankoraŭ pli kore mi dankas por la laboro,kiun vi dediĉis al LA PACDEFENDANTO.Kredu, ke mi admiris vian kuraĝon,kiu ebligis al vi skribi la veran veron. Certe multaj niaj samideanoj ĉerpis el viaj vortoj esperon al plua laboro kaj persisteco por fideleco al nia ideo,kiu estas la plej nobla por propagandi la pacon kaj interligilon inter la diversnaciaj homoj.Mi do sendas al vi pluan monon por abono de via PACDEFENDANTO ĉar mi konsideras ĝin la plej oficiala parolanto de la pensoj de plejmulto de niaj gesamideanoj.80.- Kčs mi sendas krome kiel jarabono por mia sveda kamarado.......... Ing.Jaromír Řebíček- Havlíč.Brod

...... mi sendis aktualajn sciigojn por via bonega PACDEFENDANTO kaj petas konstantan alsendon d

tiu revueto,el kiu mi ofte tradukas partojn por uzi en murgazeto kaj hungaraj pac-gazetoj.Estus granda domago se gi finigus.....
Pál Balkányi - Budapest -
....... kragiga estas la fakto, ke spite de ĉiuspecaj malfacilaĵoj via movado ankoraŭ vivas,dank al la persistemo de gia anaro,kaj antaŭ ĉio al la sindonemo de gia gvidanto,kiu pravas kontraŭ la kalumniojn por la sukceso de nia idealo de paco kaj interfratigo. Gratulojn por via fruktodona laboro.Okaze de la Novjaro mi dezi-ras al vi sanon kaj prosperon en via poresperanta kampanjo. Dank al via iniciato ne estas rompitaj la kontaktoj inter la esperantistoj de ambaŭ partoj de la mondo,homoj apartigitaj nur de artefaritaj baroj,sed kies koroj sopiras al tutmonda interpacigo.Ni esperu,ke viaj gvidantoj iam ekkonsciigos pri sia eraro koncerne sian sintenon rilate al nia afero kaj,ke nia lingvo retrovos novan vivigan atmosferon por la bono de la laboristaro. Mia opinie,senperaj kontaktoj inter la popolamasoj estas la plej taŭga kontribuilo al la mondpaco. Ne en kabinetoj efektiviĝos la homa interpacigo. Lucien Bourgois,Francio

## - P A C B A T A L A N T I N O -

/daŭrigo el januara n-o./

El ĉio ĉi lernis k-dino.Procházková malamegi ĉiujn,kiuj preparas militon.Dum la unuaj tagoj de paco ŝi konsciigis,ke estas nece se batali kontraŭ la militfortoj. Ŝi priservis en la fabrikejo unu maŝinon.Kiam ŝi ekscii̇s,ke la laboristoj plialtigas la produktivecon priservante pli da maŝinoj, ŝi decidis produkti pere de du maŝinoj.Baldaŭ postsekvis ankoraŭ pluraj kunlaborantoj,kiujn ŝi sukcesis same konvinkigi.

Jam preskaŭ antaŭ kvar jaroj komencis kamaradino Procházková labori pere de du maŝinoj."De tiu tempo multo ŝangiĝis" -ŝi diras. „La militbruligantoj elvokis novan sangdisverŝon en Koreio,Vietnamo,Malajio kaj ĉie,kie ili enpenetris,ili alportis morton kaj perfortigon al miloj da senkulpaj homoj.Ĉion ĉi mi observadis kaj en la koro mi kun la malfeliĉaj patrinoj travivadis iliajn suferojn.Mi ja posedas 4 infanojn kaj nenia ofero estus por mi tro granda por garantii ilian feliĉon."

Nia respubliko vivas en paca socialista konstruado.La infanoj de kamaradino Procházková estas feliĉaj.Ilia patrino fieras pri tio ,ke tri el ili jam kunhelpas konstruadi la respublikon.

En la vetkonkurado por akiri titolon de „plejbona laborulo" estis kamaradino Procházková ĉiam la unua.Farinte plibonigan proponon por la produkta procezo kaj pli bona organizado de la laboro,la fabrikejo ŝparis 4-5 laborfortojn.K-do.Ĉambura lernis al ŝi reguladi la maŝinojn sekve de kio ŝi de la pasinta majo laboras jam ĉe 6 maŝinoj kiel arangistino.Por ŝiaj sukcesoj en la laboro ŝi ricevis de la respublika prezidanto,k-do.Klement Gottwald la Ordenon de Laboro.

Rekompence ŝi ankaŭ ricevis pasintjare senpagan refreŝigan restadon ĉe la Blatenlago en la Popoldemokrata Hungara Respubliko.

Kiel klaskonscia komunistino ŝi estas ekzemplo ne nur sur sia laborloko,sed ankaŭ en la publika vivo.Por la komuna afero de forta kaj bela patrio ŝi penas akiri ankoraŭ pluajn kaj pluajn civitanojn.Pro ŝia modela konduto,antaŭ ne longe oni ŝin elektis prezidantino de la distrikta pacdefenda komitato.Nun ŝi preparas sin,elektita kiel delegitino,por partopreni la duan kongreson de la ĉeĥoslovakaj pacdefendantoj.„Kiam mi revenos de la kongreso,ŝi diras,mi ŝatus fari multon en ni distrikto por konvinkigi kaj akiri ankoraŭ pli multe da honestaj homoj por la aktiva defendo de la mondpaco."-

El la centra organo de la ĉeĥoslovaka komunista partio :
„R U D É P R Á V O"
Trad. Rud.Burda

KOREKTIGO : en la jan.n-o.sub „LENIN" devas esti anstataŭ dekdu jaroj -dudeknaŭ jaroj en la 1.lin.

## Ni konstruas

El ĉeĥa orig.trad.A.Kubala-Ostrava

Teksto:Fr.Halas Muziko:Dbiáš




La kvaran de februaro mortis pro malsano en la ago de 40j. nia k-do.Bohumil N Ě M E Č E K faka instruisto en Dobřany.La Esp-rondeto en Plzeň, kies membro li estis, kune kun nia redakcio esprimas sian profundan kondolencon al lia familio.

## SKLAVKOMERCO EN MEZAFRIKO

La franca kapitalista gazeto „Le monde" publikis la 26.de januaro jenan raporton :

„Londono, la 24.de januaro-membro de la parlamenta frakcio de Labour-Partio, la pastro R.W.Sorensen raportis hieraŭ sian intencon, demandi la ministron por kolonioj Oliver Litleton la 18.de februaro en parlamenta kunveno, ĉu li scias pri la komercado kun sklavoj, kiu daŭre ekzistas en Mezafriko kaj kion li intencas entrepreni por ĝia foriĝo.
Laŭ pastro Sorensen estas la sklavoj kolektataj en Ugando kaj Kameruno de kie ili estas vendataj al Saŭdi-Arabio.Laŭ unu brita gazeto oni transportas ĉiumonate kvin mil da sklavoj trans la Ruĝa maro."

Malgraŭ tio, ke ni ankoraŭ ne scias la respondon de la koncerna ministro, ni povas publiki lian deklaron el novembro 1951, en kiu li asertas:
„La registaro faros ĉion eblan por helpi al la koloniaj registaroj kaj ĝiaj organoj en ilia zorgo pri la sano, riĉeco kaj feliĉo de la koloniaj nacioj."

Ugando estas sub la estreco de Britio kaj kiel tie aspektas la zorgemo de la brita ministro, dokumentas la brita pastro R.W. Sorensen.

Ne estas pro tio mirinda afero, kiam la koloniaj nacioj daŭre pli kaj pli ribelas kontraŭ la kapitalista jugo kaj luktas por sia nacia liberigo.

El „RUDÉ PRÁVO"

## K A P I T A L I S T A  ĤAOSO

Ĉe la nederlandaj laborborsoj estas 111.461 oficiale registritaj senlaboruloj al kiuj la Ĝenerala senlaborula kaso pagis en 1952 dum la 3.kvaronjaro preskaŭ 10 milionoj da guldenoj subvencion.Nun la registaro estas devigata laŭ la „Technical assistance programme" doni laboron al fremdlandaj senlaboruloj.Laŭ la supra programo devas ricevi 400 jugoslavaj senlaboruloj okupon en la okcidenteŭropa industrio.El ili jam 20 estas dungitaj ĉe la nederlanda ŝipindustrio.

El informa bulteno de la nederl.sindik.konfederacio

# El la mondo

ČEĤOSLOVAKIO, la 28.11.1952 dissendis la ĉeĥoslovaka Esp. Asocio cirkuleron al ĉiuj Esperanto-organizoj-gazetoj kaj eldonejoj en kiu ĝi anoncis sian likvidigon kaj la samtempan likvidigon de siaj presorganoj „Esperantista", „Esperanto-Servo" kaj „Slovaka Esperantisto" kun la peto, ĉesigi la kontakton, ĉar ĝi fermas sian oficejon. Intertempe niaj eksterlandaj gekamaradoj havis la okazon konvinkiĝi, ke malgraŭ la likvidiĝo de tiu centra asocio la progresemaj k klaskonsciaj esperantistoj en ĈSR. ne konsentis kun la likvidiĝo kaj vigle daŭrigas en sia agado per Esperanto por la mondpaco. Ni deziras daŭrigi la kontakton kiel Esp-rondetoj de uzinaj kaj urbaj klerigaj kluboj kun ĉiuj, kiuj kontaktis kun la iama, nia centra asocio en ĈSR. Ni interŝanĝas nian bultenon kun ĉiuj Esp-redakcioj, akceptas anoncojn, raportojn kaj donas ĉiujn necesajn informojn. Direktu vin al nia redakcio. Bonvolu represi en ĉiuj Esp-gazetoj.

SVEDIO, la sveda Laborista Esperanto Asocio en kunlaboro kun la tag-ĵurnalo „Aftontidningen" arangos aŭtune 1953 en Stokholmo tutmondan ekspozicion de infandesegnaĵoj. La moto de la desegnaĵoj estas: „Laboro kaj festo en nia hejma regiono". La desegnaĵoj povas esti koloraj aŭ blanknigraj. Sur ĉiu desegnaĵo devas esti notita la nomo de la aŭtoro-infano, aĝo kaj adreso, kaj la titolo de la desegnaĵo en Esp. kaj nacia lingvo. Aŭtoroj povas esti infanoj ĝis 15 jaraj. Ĉiu ricevos rekompencon. Post la stokholma ekspozicio tiu cirkulos en la tuta lando. Tiu ĉi ekspozicio havas la sencon dokumentigi al skeptikuloj la praktikan valoron de Esp-o. por la interpopolaj rilatoj. Turnu vin al: SVEDA LABORISTA ESPERANTO ASOCIO, Barnhusgatan 3, STOCKHOLM, SVEDIO.

JUGOSLAVIO, en konsento kun la Kultur-ministerio en Serbio, Esperanto estis enkondukata en la blindulinstituto de Zemnun kiel deviga fako de la 4.klaso de la elementa lernejo ĝis la 4.klaso de la gimnazio.

NEDERLANDO, laŭ enketoj de la nederlanda laborista esperantista ligo/FLE/ekzistas almenaŭ en 21 nederlandaj urboj publikaj bibliotekoj, kie eblas pruntepreni esperantajn librojn kaj priesperantan literaturon.

## V E R D A J   O N D O J   F U N K C I A S

Laŭ mezeŭropa tempo.
Mallongigoj: I= informoj, P= paroladoj, K= kursoj, M= muziko.

LUNDE:
- 10.00-10.30 Hilversum II. 298m, 188m, NCRV: M/nur la 9.2.1953/speciala sendo

MARDE:
- 12.55-13.00 BERN, 31,46m, 48,66m, P de d-ro Arthur Baur.
- 16.00-16.20 VIENO II, 25m, 30m, 41m, 48m, 203m: P nur ĉiu dua marde, 27.1.ktp.
- 18.35-18.40 BERN, 31,46m, 48,66m: P de d-ro. Arthur Baur.

MERKREDE:
- 16.45-17.00 GRAZ, 417,2 m,: K
- 19.00-19.20 ROMO, 25,21m, 31,35m, 49,92m: P
- 20.30-21.00 MADRID/Radio SEU/42,33 m, 225m: P
- 22.35-22.40 VIENO, 25,46m, 48,74m, 513m: I
- 23.15-23.30 HILVERSUM, I., 402m, VARA: I kaj M

ĴAŬDO:
- 8.35- 8.40 RIJSSEL/Lille/218m: I
- 9.30- 9.45 PARIZO, 348m: K de P. Delaire.
- 12.55-13.00 BERN, 31,46m, 48,66m: P de prof. Edmond Privat pri „Esperanto-ideolog."
- 18.35-18.40 BERN, 31,46m, 48,66m: P ripeto de posttagmeza programo.

VENDREDE:
- 19.00-19.20 ROMO, 25,21m, 31,35m, kaj 49,92m: P
- HILVERSUM II, je 23.15-23.30 je 298 m, 188m, NCRV: P pri: „La Evangelio en Esperanto" kaj M /nur 6.2, 6.3., 17.4., 15.5. kaj 12.6.1953.

SABATE:
- 9.30-10.00 RIO DE JANEIRO, 30,71m, 375m: K kaj I.

# NIA MOVADO EN ĈSR

JABLONEC n/N. Nia laboro ne ekdormis, sed dum la lastaj semajnoj ni denove preparas pli aktivan agadon en la rondo de niaj gejunuloj el la Ligo de ĉeĥoslovaka junularo, kiuj jam pli frue eklernis Esperanton kaj nun ili venis, ĉar ili ege deziras kontakti kun eksterlando. Ni ankaŭ tre intime kunlaboras kun la Distrikta Pacdefenda Komitato en Jablonec, kies sekretario mi estas. Jam kelkfoje ni ekspozicis publike materialon el Hiroshima pri atombomba efiko kaj fotomaterialon el Ĉinio kun bonega sukceso. Nenie ni renkontiĝis kun malfacilaĵoj pro tio, ke ni ĉion arangas per Esperanto. Avantaĵo estas, ke nia rondeto de junuloj konsistas el konsciaj defendantoj de nia popoldemokrata respubliko kaj ili ege sopiras, helpi per Esp-o en la defendo de la paco. Tre plaĉis al ni la letero de japana k-dino. en unu el la lastaj n-oj. de la Pacdefendanto, kie ŝi riproĉis al niaj esp-istoj malintereson pri politikaj kaj aliaj aktualaj problemoj. Ni pensas, ke ŝi profunde divenis nian situacion. Ankaŭ ni nun preparas kolektivan respondon al „Infanoj de atombombo", kiun de ni petis japanaj k-doj. el naturscienca fakultato en Osaka. Ni tradukis kelkajn rememorojn el tiu libro kaj sendis al pioniraj grupoj en Jablonec, kiuj pri tio diskutas en la grupaj kunvenoj kaj skribos respondon, kiun ni dediĉos al la jap. infanoj.

M. Jíra

OLOMOUC, Dimanĉe la 4.1.53. okazis en Olomouc laborkonferenco de la Esp-grupoj el la sindikataj uzinaj kaj urbaj klerigaj kluboj. Partoprenis 90 delegitoj el 29 lokoj. /el regiono Olomouc 37, Ostrava 27, Brno 6, Gottwaldov 5, Jihlava 6, el bohemiaj regionoj 8 kaj el Slovakio 1 delegito/. Oni pritraktis detale la situacion de la Esp-movado en tiuj regionoj kaj decidis komunan agadprogramon por la esp-istoj el la regionoj Ostrava kaj Olomouc por la jaro 1953. Estis fondita komuna laborkomitato, kies presidanto fariĝis k-do. Vladimír Slaný el Ostrava. Post tagmeze estis inaŭgurita speciala Esperanto-sekcio en la regiona muzeo de Olomouc, kies celo estos konservi kaj ekspozicii ĉiujn dokumentojn pri la komenco de la Esp-movado en la regiono de Olomouc. Interkonatiĝan vesperon en la klubejo partoprenis 110 personoj. La kulturan kaj amuzan programon donis plejparte nia junularo el Olomouc kaj el Přerov.

SKALICE, en 1947 ni konsideris taŭgan la tempon por ree komenci agadon por Esperanto sur la bazo forigi la nacian malamon, kiu plejparte kaŭzis bataligi senkulpajn homojn unu kontraŭ alian. Ni unue praktikis sole, poste ni arangis privatan kurson kaj nia anaro kreskis. Sur tiu bazo ni evoluiĝis. Ni aliĝis kiel grupo al EAĈSR. kaj post ĝia likvido ni transiris kiel rondeto al la uzina klubo de „BORO-KRISTAL". Tie ni arangis publikan Esperanto-kurson kun 32 gelernantoj, kiu finiĝis la 29.1.1953. Nune ni daŭrigas per konversacioj. Inter ni estas multaj Germanoj, kiuj per Esp-o. laboras por la paco kaj homamo. Ŝultro ĉe ŝultro kun nia registaro ni batalas por la paco kaj socialismo. Esp-o. estas la rimedo por realigo de tiuj ĉi celoj.

PLZEŇ, kurso kun 9 lernantoj sub la gvido de k-do. L. Proskovec bone daŭrigas. Konversacio por infanoj okazas ĉiu vendrede de la 17. en nia klubejo. La maturaj gek-doj. kunvenas ĉiu merkrede de la 19.h. La lasta membrokunveno estis kontentige vizitata. La 8.2.53. ni arangos letervesperon en kiu ni laŭtlegos interesajn leterojn kaj kritikojn koncernantaj la Pacdefendanton. La 25. de febr. okazos la generala kunveno kun elekto de nova komitato. Fine memoriga prelego pri nia popola venko dum la febr. tagoj en 1948. Ĉiuj membroj inkluzive la infanoj vigle korespondas.

BRNO, la 3. de febr. okazis membra kunveno. La 10. estos varia vespero kiun plenumos operkantistino, kdino Věra Borská. La 24. par. J. Ballay pri Interesaĵoj el la tuta mondo.

# KORESPONDI DEZIRAS: " necesas!



LA PACDEFENDANTO estas abonebla ĉe nia redakcio kontraŭ pago de 30.- Kčs. Al eksterlando ni ekspedas ĝin per 30.-Kčs,aŭ 10 internac.resp. kuponoj, sp.libro,broŝuro,aŭ interŝanĝe kontraŭ regula alsendo de eksterlanda Esp-gazetoj. Ĉeĥosl.gek-doj.povas ĉe ni abonpagi al siaj korespondantoj kontraŭ pago de 50.-Kčs.Bonajn raportojn ni rekompencas per pago aŭ Esp-libroj el eksterlando. Ordinara korespondanonco unufoje presota kostas 10.-Kčs aŭ 2 respondkuponojn. Al anoncantoj estas devigataj almenaŭ 1 foje respondi.

ESPERANTO-SOCIETO,OLOMOUC,Ĉeĥosl. proponas al la Esp-grupoj en popoldemokrataj landoj kolektivan korespondadon kaj interŝanĝon de spertoj el la por-kaj peresperanta laboro.

K-do.Erik NILSSON,/11jara/Box 44, BROMÖLLA,Svedio,korespondas kaj interŝanĝas p.m. kun infanoj.

K-do.Zbigniew OLSZANOWSKI, Ulice Krotoszynska 16,ODOLANÓW,pov.Ostrów Wlkp. Polio,koresp.kaj interŝanĝas il.p.k.,p.m. kaj il.gaz. kun la tuta mondo.

K-do.Stefam NAMYST, ODOLANÓW,pov. Ostrów Wlkp.,Ul.Krotoszynska 8, Polio,koresp.kaj interŝanĝas il. p.k.,p.m. kaj il.gaz.kun ĉiuj l.

K-do. Stefan STEFANOFF,Ul.„Vela Peeva" č.16,BOURGAS, Bulgario,interŝanĝas sportgazetojn,p.m. kaj il.p.k. kun ĉiuj landoj.

K-do.Štefan TERENČÍK /lernejestro/ učitel řed.nár.školy,BUDČA, okr. ZVOLEN,Slovakio ,ČSR.,kun ĉiuj l. respondo certigita.

K-do.VESELÝ František,Cihelní 20-46,Brigádnický tábor, OSTRAVA I. Ĉeĥoslovakio,pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj.

K-do.GLÖCKNER Paul /studkonsilanto/Damaschkestrasse N-o.24,PIRNA COPITZ /10/ Germanio,DDR.deziras kontakton kun instruistoj kaj pedagogoj el Slovakio speciale kaj el Ĉeĥoslovakio generale por ricevi raportojn kaj spertojn pri la instrua kaj lerneja vivo por publiki en germa[illegible]j gazetoj. Vi per tio helpas al Esp-o en DDR.

K-do. Hisao [illegible]ATSUI,Sakai-si, Hamadera Suwanomori-tyo,Higasi 2 Tyo,170, OSAKA-HU,Japanio,koresp. kaj interŝanĝas p.m.,librojn,fotojn ktp.kun ĉiuj landoj.

K-do.Ján DOVČÍK, VP-pobočka,ZVOLEN,Slovakio,Ĉeĥoslovakio,koresp. kun ĉiuj landoj.Resp.garantiata.

ESPERANTO-RONDETO,pošt.schr. 232 PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio,ĉiuj membroj dez.kor.kun ĉiuj landoj kaj inter-ŝanĝi soc.k.pripacajn bildafiŝojn.

## INFORMO

Samposte ricevas la abonantoj la dec.n-on.de EL POPOLA ĈINIO. La januaran n-on.jam vi ricevos el Praha de ORBIS.La peranto transdonis tien jam ĉiujn abonantojn, kiuj ĝis nun al li pagis por 1955 Ti-kiuj ankoraŭ ne pagis bonvolu sin turni rekte al jena adreso : ORBIS - novinářství -sekretariát Slezská č.13,PRAHA-VINOHRADY.aŭ al la Esp-klubo,k-do. Šustr en PRAHA.

Eldonas: OSVĚTOVÁ BESEDA - kroužek esperantistů - Plzeň
Redaktas: K-do.Rudolf BURDA,Palackého nám.č.6, Plzeň.
ĈEĤOSLOVAKIO